

KATALUNA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



MAJO-JUNIO 1951

N-RO 177

Literatura Mondo

La plej bona Esperanto-revuo, redaktata de la hungaraj samideanoj

Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy

Kunlaboro de la plej eminentaj esperantistoj

Luksa monata gazeto, grandformata, pri

Literaturo kaj Arto

kun abundaj gravuroj.

Agento por Katalunujo: S-ro F. MONTSERRAT
Provença, 99 - Barcelona

ESTIMATAJ SAMIDEANOJ!

Iam vi intencas aĉeti librojn, aboni al iu ajn gazeto, aniĝi al iu ajn Asocio k. t. p., kaj vi ne scias kien direkti viajn paŝojn. Nu,

IBERIA ESPERANTO-SERVO

provizos vin de gramatikoj, vortaroj, materialo por kursoj—Tabeloj por helpi al kursgvidantoj. Gramofon-diskoj por esperanta instruado.

Pere de ĝi vi povas aboni al tutmondaj esperantaj gazetoj kaj aliĝi al plej gravaj Esperanto-Asocioj Internaciaj kaj Naciaj.

Insignoj tre diversaj; sigelmajloj por propagando; poŝtkartoj, paperfolioj kun kovertoj; esperantajoj, k. t. p.

ĈION PRI ESPERANTO PETU DE S-RO FERD. MONTSERRAT, str. Provença, 99, 1.^a, 4.^a, Barcelona (Apud str. Borrell. Aŭtobuso E.)

KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Direktoro: Jaume Grau Casas, L. K.
Ĉef-Redaktoro: S. Alberich Jofrè. Redaktoro: Manuel Rodellar.
Redakcia Sekretario: Eduard Capdevila.

JARABONO:

Eksterlande: 6 pesetoj
Enlande: 5 pesetoj

ADRESO:

Valencia, 245-BARCELONA

THÉOPHILE CART MORTIS!

Ne plu estas inter ni nia karega Prezidanto de la Akademio! La morto forprenis lin subite, neatendite. La 21-an de majo, matene, kiam, eksidiĝinte ĉe skribotablo, li volis komenci la korektadon de presprovoj de la bulteno de Esperantista Akademio, li sentis sin ĝenata de malfacila enspirado, apogis siajn brakojn sur la brakseĝon, kaj mortis. Lia morto venis al li dolĉe, sendolore, tiel, kiel li meritis, tia, kia estis lia vivo. Vivo plena de memofero, de laboro, de konsilado, de ĉio; kaj ĉio estis por Esperanto, por la Internacia Lingvo.

Lia malkaŝa karaktero ravis ĉiujn. Liajn lingvistikajn konsilojn ŝatis ĉiuj. Depost la morto de la Majstro, li reprezentis por ni la stelon de nia flago, tiun stelon kun blanka ĉirkaŭo, flankstarantan en nia standardo. Kaj tiu standardo, sub lia firma teno, neniam deflankiĝis, impone staris.

Th. Cart-Lingva Unueco. Du malsamaj nomoj en unu sola esprimo. Li amis la pliriĉigon de nia vortaro, sed defendis la gramatikon de senutilaj enkondukoj. Antaŭ kelkaj jaroj, nia amiko kaj Direktoro de "K. E.", S-ro. Jaume Grau Casas, aperigis sur tiuj-ĉi paĝoj kelkajn tre interesajn notetojn en formo de Lingvaj Respondoj; nia plorata Th. Cart tuj rimarkis ilin, kaj gratu-

lis lin per sinceraj dankemaj vortoj. Neforgesinda estas lia skribotrajto. Liaj koncizaj poŝtkartoj estos por ni agrablaj rememoroj...

Kataluna Esperantista Federacio, la Redakcio de ĝia presorgano "Kataluna Esperantisto", kaj la tuta samideanaro enlanda, sendas al la funebrantaj vidvino kaj familio sian plej sinceran kaj elkoran kondolencon.

NOVA ARANĜO DE NIA REDAKCIO

Ĉar nia Direktoro S-ro Jaume Grau Casas transloĝiĝis al Sant Quintí de Mediona, nia Redakcio estas aranĝita jene:

Direktoro: S-ro Jaume Grau Casas, L. K. — Ĉef-Redaktoro: S-ro S. Alberich Jofre. — Redaktoro: S-ro Manuel Rodellar. — Redakcia Sekretario: S-ro Eduard Capdevila.

ADRESSANĜO DE KEF. KAJ KE.

Kataluna Esperantista Federacio kaj la redakcio de Kataluna Esperantisto transloĝiĝis al la antaŭa adreso: str. València, 245, Barcelona.

Ni devas ŝpari la pagon de sendependa luejo por eviti la malaperon de nia kara presorgano Kataluna Esperantisto.

Nur dank' al la senfina ĝentileco de nia kara kaj malnova amiko, iama prezidanto de KEF., sro. Delfí Dalmau, ni povos uzi lian Liceon por niaj esperanto-aferoj.

ALS NOSTRES LECTORS

A l'objecte de completar la collecció de la nostra Revista que figura en els arxius de l'important fundació "Internacia Esperanto-Muzeo" de Viena, preguem encarescudament als nostres amics i llegidors la tramesa dels següents exemplars de "Kataluna Esperantisto": any 1914: Gener, Març, Juliol i fins Desembre. 1915: Setembre, 1917: Maig i fins a Desembre, 1921: Gener, Febrer i Març de "L'esperantista català". 1928: Agost.

Hem de remarcar als nostres lectors que "Internacia Esperanto-Muzeo" de Viena, és una institució oficial de l'estat austríac, subvencionada i protegida pel mateix, i que s'estatja en un superb palau a la inauguració del qual va assistir amb caràcter oficial el President de la República Federal Austríaca.

Es, com poden veure els nostres KEF-anoj, interessant la posseŝio dels mentats exemplars de "Kataluna Esperantisto", i esperem que els individus que els posseeixin i no els colleccionin ens els envaran tot seguit, contribuint d'aquesta manera a la difusió de l'òrgan dels esperantistes de Catalunya.

LA REDACCIO

PRI LA NACIA LIBERECO DE KATALUNUJO

Multajn gratulojn de eksterlandaj esperantistoj ricevis ni katalunoj okaze de la proklamo de la Hispana Respubliko kaj de la rekono de la Aŭtonomio (self-government) de Katalunujo. Plej koran dankon al ĉiuj!

Aparte ni devas danki niajn flandrajn amikojn, duoble samideanojn, pro ilia simpatio al ni. En speciala artikolo ni raportas pri ilia sinteno.

* * *

La 14. aprilo 1931, je la 1^a p. t. m., estis proklamata en Barcelono la Kataluna Respubliko, sub prezido de S-ro Francesc Macià.

En la sama tago, kelkajn horojn poste, estis proklamata en Madrido la Respubliko Federacia Hispana, al kiu apartenas federacie la kataluna ŝtato, nun ne plu nomata oficiale respubliko, sed: Generalitat de Catalunya. La unua sekvo estis la oficialigo de la kataluna flago (antaŭe malpermesita eĉ en privataj rondoj) kaj la enkonduko de la kataluna lingvo en la publikaj lernejoj kaj en la Barcelona Universitato.

* * *

Nia Kataluna Esperantista Federacio sendis la jenan leteron: Barcelona, 27 d'abril de 1931.

Senyor Francesc Macià, President del Govern de la Generalitat de Catalunya. — Ciutat.

Honorable senyor: La "Federació Esperantista Catalana", en assemblea general celebrada el dia 19 del corrent, prengué l'acord de felicitar-vos entusiàsticament i palesar-vos la seva profunda adhesió al President del Govern de la Generalitat de Catalunya.

La nostra Federació, que des de 1909 treballa per tal de propagar a Catalunya la llengua auxiliar internacional ESPERANTO amb caràcter de *segona* llengua per a tothom, ha reconegut sempre com a *primera* llengua dels catalans la parla acolorida de Bernat Metge, i conseqüentment avui exulta amb autèntica joia.

Utopistes com érem, avui veiem en el reconeixement dels drets de la llengua catalana el triomf de la meitat del nostre ideal, tot esperant que en el dia no llunyà la llengua internacional Esperanto s'imposi, per a la major comprensió i efectiva germanor de tots els pobles de la terra.

El Secretari, *Eduard Capdevila*. — El President, *S. Alberich Jofre*.

Kaj ni ricevis la jenan respondon:

Barcelona, 3 de juny de 1931.

Senyor President de "Kataluna Esperantista Federacio". — Ciutat.

Distingit senyor: M'és grat regraciar-vos la vostra afectuosa komunikado que m'adreceu amb okazo d'haver-se konstituit el Govern de la Generalitat de Katalunya. Konfio ke la vostra kolaborado no ha de mankar-nos i ke kontribuireu en tot moment al sosteniment del reĝim ke hem implantat.

Cordialment vostre, *Francesc Macià*.

ANDREO ĈE EN BARCELONA

Ne estas necese fari biografion pri la aŭtoro de la nova metodo, kiu portas lian nomon, pri klarigado de esperanto-kursoj.

Multajn sukcesojn li atingis en norda Eŭropo, kiuj evidentigis la taŭgecon de tiu nomata "metodo Ĉe". Li esperantigis multajn centojn da personoj el ĉiuj medioj kaj klasoj, kaj ĉiam eksterordinare elstaris la mirinda rapideco per kiu tiu rumana pastro ellernigas la mekanismon de Esperanto. Nur 15 tagoj kun duhora leciono estas necesaj por ke Andreo Ĉe per sia metodo kreu novajn kaj lertajn esperantistojn.

Estas tiom granda lia sukceso, ke oni starigis "Instituto Cseh" en Arnhem (Nederlando), kiu zorgas pri la organizado de tiuj esperanto-kursoj kaj pri la unueco de la uzata metodo, kiu alie jam suferis interesajn plibonigojn.

Instituto Cseh ne nur havas kiel gvidanton Sron. Andreo Ĉe, sed ankaŭ kreis profesorojn de tiu nova metodo inter la malnova esperantistaro, inter kiuj troviĝas nia kara amiko kaj eminenta poeto Julio Baghy.

Kataluna Esperantista Federacio decidis fari la necesajn paŝojn por venigi Sron. Andreo Ĉe al Barcelona. Tiucele ni kreis komitaton, kiu zorgos pri la financa kaj propaganda agadoj.

Ni petas niajn enlandajn samideanojn bonvolu propagandi inter la konatuloj ne-esperantistaj, pri la profito de tiu okazo, kiun KEF. prezentas al ĉiuj niaj simpatiantoj. Prefere ni atentigas pri tio niajn samideanojn en Sabadell, Terrassa, Girona, Manresa kaj Vic, kie estas kelkaj pioniroj, kiuj povas aranĝi Ĉe-kurson. Petu tuĝ detalojn ĉe KEF., València, 245, Barcelona.

PER-ESPERANTA INTERNACIA SOLIDARECO

La Flandraj Esperantistoj kaj ni Katalunoj.

Jam kelkfoje ni raportis pri opinio de Flandraj Esperantistoj rilate al katalunaj aferoj. Nun, ne plu sub la jugo de la cenzuro, ni ĝojas transkribi kelkajn pecojn.

La ĵurnalo "De Schelde", Antwerpen, 8-julio-1928, aperigis en flandra lingvo la jenan artikolon.

ĈE LA KATALUNAJ ESPERANTISTOJ

La Katalunaj esperantistoj havas, depost 1910, propran "Kataluna (n) Esperantista (n) Federacio (n)", al kiu aliĝis 17 grupoj kun pli ol 600 membroj.

Ilia organo "Kataluna Esperantisto" multe distingigas super la plimulto de la aliaj esperantaj revuoj per sia bonega, interesa enhavo, kaj ludas influan rolon en la disvolviĝo de la ĝenerala esperanto-literaturo.

Ili ankaŭ organizas ĉiujare tiel nomitajn "Floraj (n) Ludoj (n)", dum kiuj i. a. estas aljuĝataj sufiĉe grandaj monpremioj por poezio kaj prozo en esperanto, kaj de kies ĵugantaro, ĉi tiun jaron la prezidanto de "Flandrema Grupo Esperantista" estis invitata membriĝi.

Okazon por konatigi siajn aspirojn kiel subpremita popolo per sia organo, niaj Katalunaj samideanoj ne havas, ilia revuo devas esti submetita al la cenzuro. Ilia agado estas tiel limigita je bona "poresperanta" propagando.

Sed tio estas eĉ tro laŭ la diktatoro Primo de Rivera. Tio evidentigis el la sekvonta letero, kiun ni —same kiel la respondo— tradukas laŭvorte el la Hispana:

"Provincestro de la Barcelona Provinco.

"Numero 4.094.

"Ĝenerala Sekretario. Konsiderante ke la redakto de la regularo "de tiu ĉi Federacio povas konduki al eraroj, kiujn oni devas "antaŭgardi, mi vidigos ke, pri ĉio koncernanta la internaciajn "rilatojn Vi starigos solidarecon kun la ceteraj societoj, kiuj kun "sama celo funkcias en la cetera Hispanujo, tio estas, ke estos "formale malkonfese ke en la ombro de ŝajne kultura societo "oni laboras por la plikreskigo de malamo kaj malkuniĝo inter frataj regionoj.

"Bonvolu atesti pri tiu ĉi komunikado kiu devas esti plenumita en la daŭro de kvin tagoj.

"Dio Vin gardu multajn jarojn.

"Barcelona la Ian. de Junio 1928.—J. Milans del Bosch.

"Sekve kun plena aliĝo al la Hispana Esperantista Societo kaj ne plu sin nomanta Kataluna.

"S-ro Prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio".

Al tiu letero, kiu ne bezonas komenton, la prezidanto de la Federacio respondis jene:

"La subskribinto, Delfi Dalmau Janer, ano de ĉi tiu urbo laŭ legitimiga karto klaso II, N.º 17.597, prezidanto de "Kataluna Esperantista Federacio", havas la honoron sciigi la ricevon de "Via honoriga sciigo de la 1-an de Junio pasinta, koncerne la agadon de l' nomita Federacio, kaj li havas la plezuron sciigi al "Vi, ke pro obeemo al la ordonoj de Via Provincestra Moŝto "la vorto Kataluna aŭ Catalana estos forigita de nia Esperantista "Federacio kaj ke en la sekvonta kunveno, anoncita kaj organizita en Vinaroz —ekster Katalunujo— kiel alifoje en Palma de "Mallorca kaj Sóller, la formo por aranĝi la aliajn indikojn de "Via Provincestra Moŝto, estos submetita por pristudo.

"Ĉiuokaze, la fakto ke nia Federacio havas nur Esperanton "kiel celon, kiel pruvas la aliĝo de esperantistoj el la Balearoj, "el Valencia, Aragon kaj Kastilujo, k. t. p., kiuj loĝas en la regiono indikita per la regularo, la fakto ke ĝiaj kongresoj estas "organizitaj kaj protektitaj de nunaj urbestaranoj kaj urbestroj, "kiel okazis en Santa Coloma de Farnés en 1926 kaj okazas en "la kongreso de ĉi tiu jaro en Vinaroz, povas doni garantion pri "la honesta agado de ĉi tiu Federacio, kaj ke ĉiuj "ordonoj kiuj devenas de Via Provincestra Moŝto kaj estas "dinitaj por la Federacio, kiun mi havas la honoron prezidi, ne "povas trovi la plej malgrandan kontraŭstaron.

"Kun ŝuldita respekto salutas Vian Provincestran Moŝton, kiun "Dio gardu ankoraŭ multajn jarojn.

"La Prezidanto de la Esperantista Federacio, *Delfi Dalmau*".

La Flandraj esperantistoj esperas ke la Katalunaj amikoj scios teni sian Federacion —malgraŭ ĉiu persekutado— vivanta, kaj ke ili scios konduki ĝin al ankoraŭ pli granda florado je pli granda honoro kaj gloro de Esperanto laŭ ĝenerala vidpunkto kaj, favore al la afero de la subpremitaj popoloj, laŭ ĉefa vidpunkto.

* * *

F. G. E.

"Flandra Esperantisto", kiu certe estas unu el la plej bone redaktitaj Esperantaj gazetoj, en sia numero 2 aŭgusto 1929, publikigis la jenan leteron:

NOVAJO EL KATALUNUJO

El Katalunujo oni skribis al ni:

ANTAŬEN FLANDROJ!

Kun kia ĝojo mi konstatis la aperon de la organo de viaj pensoj kaj sopiroj! Kun kia simpatio mi diras al vi tutkore: antaŭen filoj de subpremita popolo! La movado de via reviviĝo estas de neniu popolo rigardata kun pli da intereso kaj simpatio ol de la Kataluna. Ni sekvas ĉiutage la progresojn de via idealo, ni miras kiamaniere vi iras ĉiam antaŭen atingante ĉiujare novajn avantaĝojn por via lingvo, por via propra administrado. Vi eĉ ne povas imagi en via relativa libereco, la malaman sintenadon de Hispanujo rilate la katalunan movadon, persekutante la liberan esprimadon de la kataluna lingvo, malpermesante la instruon en la lernejoj, sentigante ĉie en ĉiuj aferoj la tiranan manon de siaj direktantoj.

Kaj tamen, la hispanoj neas la ekziston de la problemo de la minoritatoj en la lando! Dum la vizito de Stresemann al Hispanujo pro Ligo de Nacioj, estis atribuitaj al li la manifestoj ke "en Hispanujo ekzistas ankaŭ la problemo, pro vaskoj kaj katalunoj", Baldaŭ estis severe kontraŭdiritaj tiaj veroj pro tio ke "en Hispanujo la unueco estas perfekta depost centoj da jaroj".

Unueco perfekta, kaj oni perfortigas nin paroli hispane en la tribunaloj, ĉe la notarioj, ĉe la skoloj, kie estas severe punitaj la profesoroj de katalunistaj tendencoj, per ekzilado au translokiĝo al aliaj lokoj kiel eble plej izolaj.

La malamam al ĉio kataluntendenca vi povas kompreni per la dekreto malpermesanta la nomon *kataluna* por *Kataluna Esperantista Federacio*.

En sia freneza deziro Hispanigi ĉion, eĉ la nomo kataluna fariĝas suspekta kaj oni volas ekstermi ĝin.

La argumentoj estas ĉiam la samaj. "La malamamo de la aktivistoj por la franca lingvo", anstataŭ diri "la estimo por la propra idiomo", estas paroloj kiujn certe konas, transportitaj al sia respektiva popolo, ĉekoj, finnoj, k. t. p.

Antaŭen Flandroj! Dum la katalunoj devas atendi pro minaco de karcero, ekzilo aŭ monpunoj, nia simpatio akompanas vin ĉe via vekigo!

En Decembro 1930 "Flandra Esperantisto" publikigis la jenan noton:

La Belga Ligo-prezidanto kontraŭ... la Katalunoj. — S-ro Julio Mangada Rosenörn, kiu en sia organo "Hispana Esperanto" kiel diablo en sanktakvujo koleras kontraŭ la Katalunaj esperantistoj, fieras ĉar li "atingis je la Kongreso de Antverpeno, ke Kataluna Esperantista Federacio ne estu konsiderata *Nacia Societo*." Tamen la Katalunaj esperantistoj antaŭe estis atingintaj aperi kiel nacio en la Internacia Movado.

La afero tamen ne jam finiĝis en Antverpeno, ĉar s-ro Julio Mangada Rosenörn malsekretigas, ke "S-ro Andrés Pinó en la pasinta kongreso de Oxford, en kunveno de la reprezentantoj de la tutmonda esperanto-organizaĵo parolis favore al tiuj esperantistaj politikemuloj (dixit Mangada, red. H. E.) katalunaj, sed kompreneble li malsukcesis, ĉar la Sekretario de la *Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj* (K. R.), S-ro Frans Schoofs, energie kontraŭdiris la pretendon de S-ro Piñó."

Kion do la sekretario de la K. R. diros, kiam la Flandraj esperantistoj deziras aperi kiel nacio en la Internacia Movado?

En la numero Mayo 1931 de "F. E." ni legis.

KATALUNUJO LIBERIGIS!

Kun vigla intereso niaj legantoj certe sekvis en sia ĉiutaga ĵurnalo la lastajn okazintaĵojn en Hispanujo, kaj ni do ne devas rakonti, kiel la tieaj komunumaj elektoj forbalais la malestimindan Alfonson de lia trono.

Kun varma simpatio — kvankam kelkaj eble kun iom da malakra envio — ili certe ankaŭ eksciis, kiel la Katalunoj proklamis sian sendependecon en la lingvo, pri kiu la unitaristaj Hispanoj el Madrid pretendis, ke estis antikvaĵo, dialekto. Kolonelo Macià, kiu antaŭ nelonge ankoraŭ estis ekzilito en nia lando, nun estas la prezidanto de la Kataluna respubliko.

Por la esperanta movado la liberigo de Katalunujo estos beno, ĉar nun ĝi povos nature disvolviĝi: la gvidantoj de la "Kataluna Esperantista Federacio" ne plu devos timi persekutojn, perfidojn de... samideanoj! Kiam do ties nomoj estos skribataj sur la kolono de malhonoro?

Okaze de la proklamado de la memstareco de Katalunujo, "Flandra Esperantisto" deziras al la juna respubliko prosperon kaj feliĉon kaj petas de "Kataluna Esperantisto", ke ĝi transdonu la gratulojn de la Flandraj esperantistoj al la Katalunaj samideanoj. Ĉi tiuj neniam forgesu en bonaj tempoj tiujn, kiuj estis iliaj amikoj en malbonaj tempoj.

Flandra ESPERANTISTO

Kaj de "Flandrema Grupo Esperantista" ni ricevis la jenan afablan leteron:

Antwerpen, 23-an de Aprilo 1931.

Al la Estraranoj kaj Membroj de la Kataluna Esperantista Federacio.

Karaj samideanoj.

La "Flandrema Grupo Esperantista" el Antverpeno ŝatas transdoni al vi siajn tutkorajn bondezirojn okaze de la liberigo de via lando!

Ĝi esperas, ke la juna Kataluna respubliko florados kaj eniros epokon de prospero.

La "Kataluna Esperantista Federacio" nun libere povos disvolviĝi kaj labori por la disvastiĝo de nia Kara Esperanto en Katalunujo.

La amikeco, kiu ĝis nun kunligis Katalunajn kaj Flandrajn esperantistojn, daŭradu ĉiam.

Vivu la Kataluna respubliko!

Vivu la "Kataluna Esperantista Federacio"!

Nome de "Flandrema Grupo Esperantista".

La Prezidanto, *Jan Van Schoor*; La Sekretariino, *M. Peulset*.

* * *

Pro ĉio ni ripetis al la Flandroj nian koran dankon. Niaj ambaŭaj popoloj troviĝas en simila situacio. Ambaŭ ili tre amas sian nacian lingvon kaj la internacian, aperigas literaturan organon en Esperanto kaj eldonas en la Zamenhofa lingvo la du plej grandajn Antologiojn.

Niaj Flandraj amikoj pardonu nin, tial ke dum la pasinta persekutado ni ne ĝiam rapide respondis al ili, nek montris sufiĉan esprimemon. En la fundo de l' koro ni ja estis en daŭra interrilato.

J. G. C.

* * *

En la raporto de nia Sekretario, S-ro Eduard Capdevila, kiun ni publikigas en tiu ĉi numero, kaj en aliaj rubrikoj, la leganto trovos aliajn interesajn detalojn pri la persekuto suferita de la katalunaj esperantistoj kaj nun finiĝinta por ĉiam.

LA REDAKCIO DE K. E.

ĜENERALA KUNVENO DE K. E. F.

La 19. de aprilo 1931 okazis en la sidejo de KEF ĝenerala kunveno de gefederacianoj, kiu estis ĉeestata de multnombraj samideanoj el diversaj urboj kaj vilaĝoj el Katalunujo.

Je la 11^a matene oni komencis la kunsidon sub la prezido de S-ro Joan Gili Norta kaj kelkaj membroj de la Direkta Komitato.

La Sekretario, S-ro Eduard Capdevila, legis la akton de la antaŭa ĝenerala kunveno, kaj ĝi estis unuanime aprokata.

La Kasisto, S-ro Josep Maria Coll, legis la Bilancon 1930-1931, kiu meritigis ĉies aprobon.

S-ro Capdevila legis interesan Sekretarian Raporton, kiun ni ĝoje presas ĉi-sube:

"Karaj kunfederacianoj! — De vi ĉiuj estas konataj la kaŭzoj kiuj decidigis la KEF — gvidantojn, dum la pasinta 15-a Kongreso de Vinaroz, flankenigi de nia kara ĉeforganizajo "Kataluna Esperantista Federacio". Nia kara KEF devis kontraŭvole fermi sian brilan agadon komencitan dum la unua kongreso en Sabadell kaj daŭrigitan en postaj sinsekvaj Kongresoj de Girona, Manresa, Vich kaj Palma de Mallorca.

Dank' al la meritkapableco de kelkaj pioniroj katalunaj kaj al la ĉiufoje plifamigantaj "Internaciaj Floraj Ludoj", nia movado aperis al la ekstero kiel unu el la plej gravaj, ne pro sia vasteco, sed pro sia konstanta kunlaborado en la plivalorigo de la Esperanta literaturo. Ne intencis flatemon Lingva-Komitatano S-ro Max Butin, kiam li recenzis la verkon "Kataluna Antologio" kaj diris, ke, "el du fontoj fluegas abunde la nektaro de arto kaj poezio en nia Esperanta literaturo: Barcelona kaj Budapeŝto." Tiu ĉi elstara pozicio de nia movado en la internacia esperantista kampo, ŝajne kreskigis personan envion en la sisteme malamikecaj esperantistoj, en nia kampo, kaj kontraŭstarantoj de ĉio justa kaj demokrata en la civita vivado. Ne mirige, do, ke ili profitis la ekzistadon de la diktatoreco de Primo de Rivera kaj ties kontraŭkatalunajn tendencojn por akriigi siajn atakojn, tute ne homecajn, kontraŭ ni, kvankam Homaranismo, Interna Ideo kaj Zamenhofismo estis kelkfoje elfluantaj el iliaj lipoj.

Tuj post la okazigo de la brila kongreso en Palma de Mallorca, kiu dank' al la fervoreco de S-ro Narcís Bofill estis plensukcesa malgraŭ la nefidema sintenado de la aŭtoritatuloj, plensutitaj de denuncoj kontraŭ ni, oni rimarkis la unuan efikon de la programo de la malamikoj de K. E. F. Nia presorgano "KATALUNA ESPERANTISTO" ricevis monpunon de Ptoj. 500. pro raporto de S-ro Artur Domènech Mas pri sia partopreno en la Hispana Kongreso okazinta en Kordovo, kiel delegito de nia KEF. Ankaŭ la tiama prezidanto de KEF S-ro Delfí Dalmau suferis persekuton kaj oni intencis enkarcerigi lin. Sed la ĉefa vangofrapo okazis dum la preparo de nia Kongreso en Vinaroz, en la jaro 1928. La Bar-

celona Provincestro, instigita kaj inspirita de niaj kontraŭuloj, redaktis ordonakribajon malpermesantan al nia KEF alnomi ĝin *kataluna*, kaj li devigis nin ariĝi sub la hispana esperantista ĉeforganizajo. Kompreneble, la ĉefgvidantoj dum la kongreso en Vinaroz preferis dimisii siajn postenojn ol aliigi la tradician spiriton de KEF kaŭze de diktatoreca ordono.

Kaj nun ni staras antaŭ vi, karaj federacianoj, post unu jaro da konstanta laboro por la restarigo de nia tradicia "Kataluna Esperantista Federacio". Ni ne estis kontentaj pri la laboro de la aliigita federacio, farita dum la jaroj 1929 kaj 1930, kaj pro tio ni profitis la okazigon de ĝenerala kunveno por prezenti niajn nomojn, kiel kandidatojn en la Direktan Komitaton.

Ni alvenis al la Federacio en la momentoj kiam oni intencis oferi nian memstarecon esperantistan al preskaŭ neekzistanta asocio ne-kataluna; kaj ni povis eviti la realigon de la sonĝo de niaj kontraŭuloj, nome: dronigi la laŭrajtan kaj memvolan personecon de la kataluna Esperanto-movado en la ceteron de la hispanŝtata esperantista organizacio.

Tuj kiam ni okupis gvidan postenon en la Direkta Komitato de KEF, ni komencis labori por la konkero de la perdita kontakto kun la alinaciaj kaj internaciaj asocioj. Sed tiu laboro estis konstanta malhelpata de la sisteme opozicia sintenado de du komitatanoj, kiuj estis apartenintaj al la komitato kiun ni nin sentis devigataj anstataŭi. Kaj pro la redaktoformo de salutletero al la Flandra Esperantista Kongreso tiuj du komitatanoj memvole ekŝiĝis kaj ni estis devigataj okupigi tiujn du postenojn per du novaj komitatanoj, nome: S-ro Jacint Comella kaj S-ro Josep Banet.

Fine ni alvenis al la eksterordinara kunveno kiu okazis la 9. de aŭgusto 1930, en kiu oni aprobis restarigi, kun malgrandaj ŝanĝoj, la malnovan kaj jam tradician regularon de KEF. En tiu kunveno, oni ankaŭ plene aprobis la starigon de la "Eldona Fako de KEF" kiu estontece zorgos pri la redakto kaj aperigo de "Kataluna Esperantisto" kaj pri aliaj eldonaj entreprenoj, kiujn ĉi-sube ni raportas:

La "Eldona Fako de KEF" apenaŭ havas unu jaron da ekzistado kaj ĝi jam povas prezenti al vi du realigitajn sonĝojn de la kataluna samideanaro. Jen ili ambaŭ: PRIMER MANUAL D'ESPERANTO (Ruĝa Broŝuro) kaj ZAMENHOF-DISKO. La unua, grava paŝo por la katalunlingva propagando de Esperanto. La dua entrepreno estas honora por nia movado, ĉar ni katalunoj povis konservi por ĉiuj popoloj de la mondo la voĉon de nia amata Majstro. Ni deziras mencii la salutvortojn per kiuj estis akceptata eksterlande la reapero de "KATALUNA ESPERANTISTO", la "revuo de la Floraj Ludoj" laŭ alnomo donita de la alilandaj samideanoj.

La agado de nia Komitato ekster Katalunujo estis intensa kaj

sufiĉe fruktodona, dum tiu ĉi finiĝanta unujara periodo. Se ni diras al vi, ke ni ricevis pli ol sesdek komunikajojn de "Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado", tiu citindaĵo sufiĉos por bildigi al vi nian internacian kunrilaton. Ni estis konstante plenshutataj de konsultoj, konsiloj, proponoj pri realigindaj entreprenoj, venantaj de la dirita I. C. K., kies direktoro, S-ro Robert Kreuz, fariĝis tiom simpatia al la katalunoj depost lia kunguando kun ni de la ĉarmaj festoj de la Kongreso de Palma de Mallorca.

Ni donis al I. C. K. nian opinion pri la "mondorganizacio esperantista" elpensita de D-ro Vogt, el Stuttgart. Ni interparolis kun ICK pri la ebleco venigi en Barcelonon la eminentan mondvojaĝanton S-ron Scherer, kaj ankaŭ ni desegnis kun ICK la planon por efektiviĝi fortan propagandon por Esperanto en Andorra. Ni devis provizore rezigni je la eldono de la "Kataluna Ŝlosilo" pro nia financa stato.

Ni konstatis la gravan rolon, kiun ludas la starigo de "Internacia Esperanto-Muzeo, en Wien, kaj ni decidis sendi al ĝi niajn eldonaĵojn.

Ni ricevis dankesprimon de gesinjoroj Blaise, el Anglujo, pro nia zorgado akcepti mondonacojn por "Viena deficitio".

Ni proponis nian helpon al la Propagand-Organizo de la venontaj Internaciaj Olimpiaj Sportludoj, kiujn oni intencas okazigi en Barcelona.

Rilate la organizon de nia venonta Kongreso, laŭ la kutima solena maniero kaj kun arango de Floraj Ludoj, ni intertraktis kun la samideanoj el Sabadell, Granollers kaj Tarragona, kaj nur la samideanoj el la lasta urbo ŝajnas pretaj entrepreni tian kongreson kaj revivigon de la Floraj Ludoj. Ni esperas, ke ni fine sukcesos kunveni la tutan katalunan esperantistaron por inde repreni nian lokon en la Universala Movado.

Eduard CAPDEVILA

Post la Sekretaria raporto, oni parolas pri ĝeneralaj aferoj, kaj, laŭ propono de S-ro Jaume Grau Casas, oni decidas esprimi al S-ro Manuel Maynar, el Zaragoza, nian simpatian kaj nian deziron aliĝi al la de li projektata "Iberia Esperantista Konfederacio".

Post komentario pri la graveco de la ĵusaj politikaj okazintaĵoj kaj pri iliaj eblecoj por Esperanto, oni aklame decidas sendi salutleteron al S-ro Francisc Macià, Prezidanto de la "Generalitat de Catalunya".

Fine estis elektata la Nova Komitato de KEF, jene: Prezidanto: S-ro S. Alberich-Jofrè; Vicprezidanto: S-ro Manuel Rodellar; Sekretario: S-ro Eduard Capdevila; Vic-sekretario: S-ro Vicens Andrés; Kasisto: S-ro J. M. Coll; Kalkulisto: S-ro Manuel Palomeras; Bibliotekisto: S-ro Josep Banet; Voĉdonantoj: S-ro Jacint Comella kaj S-ro Jaume Grau Casas.

VISIÓ ANGLESA DE LA CAIGUDA BORBÒNICA I VISIÓ CATALANA DE LA VISIÓ ANGLESA

Tinc una amiga anglesa autèntica i castissa. Fins i tot he de suposar pels cops que m'ha escrit i que he pogut lligar sense que ella s'ho pensi, que és fadrina, sexagenària, i que no té sinó mare, i amigues de condició molt semblant, vull dir fadrines sexagenàries.

Ara, arran del destronament del senyor Borbó, m'ha escrit l'amiga anglesa observacions o opinions ben característiques de la seva ànima nacional:

"Escoltem amb interès vivíssim, les noves radiades sobre la vostra merevellosa revolució *sense sang*.

Sí, ja sabiem, d'ençà de 40 anys, per un amic espanyol de València, l'agitació que s'anava produint.

Però, per la meva vida, que no puc comprendre perquè Catalunya vol la seva pròpia llengua distintiva. Per què? ¿Qui es pot preocupar d'aprendre-la? Vosaltres haureu d'ésser com la gent escandinava, i ensenyar francès i anglès per raons comercials. Estic gen segura que els anglesos no aprendran mai el català.

Per més que el vostre país sembli admirar els procediments anglesos, jo penso que fou un gran disbarat o pifia de permetre que la filla germano-anglesa de la princesa Beatriu es casés amb Alfons! Quina espantosa desgràcia ha estat això! Per què redimoni no podia casar-se amb una dona de la seva raça!

Em penso que el nou règim causarà milers de "ramats" al vostre bell i ric país. Es clar que jo sé que hi ha molta, molta, molta gent pobra i analfabeta."

He respost a la meva vella i anciana amiga que els catalans volem el català perquè és la nostra llengua, sense capficar-nos per si els anglesos l'aprendran o no. I que som esperantistes, perquè no hàgim d'imposar ni de deixar-nos imposar cap idioma aliè, puix que l'única llengua que pot oferir una solució general, justa i total és l'esperanto, que no és privatiu de cap poble, i que pertany a tots indistintament com a *segona* llengua de cadascú per a les relacions entre homes i pobles de parles diferents.

Però val la pena d'aprofundir un xic més l'anàlisi de les observacions angleses, perquè, realment, són un exponent de la mentalitat i dels procediments d'aquest poble que s'ha fet gairebé l'amo del món, amo liberal, *políticament* liberal, però de fons superb i despòtic, de fons immoral molt humà, vull dir, molt mundà.

La política és la *polidesa*, les formes de salvar el màxim per al propi interès. I quant a sentit polític, els fets ens demostren que els anglesos l'han posseït i encara l'estan posseïnt com cap altre poble. Fins saben perdre de la manera més política i refinada.

Es un fet que jo, gandul, trobo, en aquest món, àdhuc dins la meua família o els meus coneguts i amics, qui treballa per a mi; que jo, jugador, perdo la meua fortuna, no sé o no vull saber guanyar-me la vida, i per evitar-se massa vergonya o bé per pietat o encara per una mena de covardia, trobo qui em manté els meus, i encara en cert grau, segons les necessitats socials que ens hauria creat la nostra posició anterior que jo m'he jugat. Es una veritat que la mare o la filla bona, que el pare o el fill bo, treballador o intelligent, fan la feina o donen orientació, sovint menyspreada, als indigents o negligents de casa. Es el cas que tot això és fet a favor dels necessitats sota la consigna de: *què hi voleu fer si és* (o són) *així* —els qui no poden o no volen poder—. Aquesta consigna humana, social, política, ha estat explotada pels anglesos d'una manera realíssima i efectiva, i presenta o descobreix el secret del fet que tant de món treballi per als anglesos, aprengui l'anglès, accepti llurs maneres i costums, fins i tot el sistema absurd de monedes i mesures angleses contra el decimal universal. Però quan tots serem anglesos, quan tots no podrem (?) treballar sinó un xic, quan no hi haurà cansats per a fer la feina, quan tots voldrem jugar i passejar i no podrem comprendre res que no sigui el propi interès, la pròpia poltroneria...

El que cou a la meua amiga anglesa és la vergonya d'una anglesa destronada.

Quan ella diu que el nou règim causarà *ramats*, pensa en la India, en una colònia britànica, on els anglesos han fet creure al món que són el nex d'unió de les llengües i les races i les castes diferents que poblen aquell immens territori. I el nou règim d'Espanya, sense una reina anglesa, sense una ombra anglesa endegadora... ha de fer desencadenar una colla de *ramats*.

Un *John* anglès, és *John* o no és res, perquè, pobret, no pot comprendre, baldament i que per pròpia voluntat s'hagi establert a Suïsa, posem per cas, no pot comprendre que esdevingui naturalment *Johan* o bé *Hans* a Berna. *Jean* a Ginebra. En canvi un *Joan*, català, sense sortir de Catalunya, ni de la seva vila nadiua, ni de la pròpia llar, li falta temps per a tornar-se *Juan*, o bé *Jean*, *John*, *Johan*, etc., tan bon punt ha après quatre mots castellans, francesos, anglesos o alemanys. Per això Anglaterra s'ha fet mestressa del món i Catalunya ha perdut tots els drets, àdhuc els més elementals.

Fins ara, en termes generals, el castellà, respecte de Catalunya, ha estat com l'anglès respecte del món. Sembla que ha arribat el moment de no caure ni en l'ajupiment dels catalans colonitzats per la dinastia borbònica, suara foragitada, ni en la supèrbia anglesa, que la civilització, el dret, ha d'abatre en els anglesos també. Castellans i catalans han d'acceptar els fets naturals amb dignitat; un castellà que passa per la nostra terra incidentalment, provisòriament, seria ben poca cosa que tot seguit se sentís ca-

talà; això no és natural ni possible, i doncs, indigne de simular-ho i quimèric de voler-ho. Però és encara més indigne que un català, dintre de Catalunya mateix renegui del propi idioma, del propi nom. I això havia assolit amb deplorable generalitat l'imperi dels Borbons damunt de Catalunya. I aquesta abjecció dels catalans, aquest servilisme, aquesta pressa a vendre's la personalitat catalana sense que cap altra sigui possible a Catalunya, és el que cal combatre per a dignificar-nos, per a normalitzar-nos.

Castellans i catalans poden ésser bons amics i bons conciutadans sòlidament, duradorament, francament, com ho són ginebrins i bernesos, tots suïssos, però amb llengua i naturalesa distintes i respectades. Sense dignitat i sense justícia no pot haver-hi amistat ni confraternitat.

Delfi DALMAU

(De "La Rambla", 17 maig, 1931).

ENLANDA MOVADO

Ni ricevis la viziton de niaj svedaj samideanaj amikoj, S-ro Erik Ekström, el Goteborg, kaj S-ro Gustav Persson, el Tureberg. "K. E. F." klopodis pasigi al ili plej bonan kaj interesan restadon ĉe ni, kaj akompanitaj de S-roj Joan Gili kaj Josep Banet, ambaŭ "K. E. F." direktantoj, ili faris ekskurson al nia mirinda Montserrat-monto.

Post unu semajno ili ekvojaĝis al Hispanujo kaj Nord-Afriko, en kies landoj ili intencis fari interesajn ekskursojn.

Ni deziras al niaj du svedaj amikoj plej bonan vojaĝon tra la Sudo, kaj feliĉan hejmevenon.

—La Grupo "Nova Sento" el Barcelona (nova adreso: Independència, 79), aranĝis vizitadon al la Observatorio "Fabra", starigata en la supro de Tibidabo-Monto. Tre instrua estis la observado de la Luno per potenca teleskopo, kio plaĉis al la multnombra ĉeestantaro.

ESPERANTO KAJ LA POLITIKO

Depost la starigo de la nova reĝimo en nia lando, ni konstatis kun ĝojo la intervenon de multaj esperantistoj en la politikon. En Terrassa, Sabadell, Banyoles, Barcelona kaj aliaj lokoj troviĝas urbkonsilantoj, kiuj laboras en nia esperantista kampo. Al ĉiuj ni esprimas niajn bondezirojn, kaj esperas ke ili ĉiam favoros nian lingvon en siaj diversaj politikaj postenoj.

DIVERSAJ JOJ

— En la “Sala Parés” Barcelona, dum la lasta Maja monato, estis ekspozicio de Katalunaj Akvarelistoj. Ni ĝojis vidi tie kvar belegajn akvarelojn de nia estimata amiko kaj samideano S-ro Jacint Comella, el Vich, kiu diversfoje estas premiita en konkursoj, eĉ Esperantaj, pri desegnaĵoj aŭ pentraĵoj.

— Nia kara amiko S-ro Joan Amades, eminenta kataluna folkloristo, malnova samideano kaj eks-prezidanto de K. E. F., edziĝis en lasta Majo je Fraŭlino Enriqueta Mallofré. Niajn bondezirojn al la novaj geedzoj.

— La multjara fervora batalanto por la internacia lingvo S-ro Fernando Soler Valls, estis nomata Telegrafestro de la Barcelona urbo. Al li transdonis la estrecon S-ro Escrich, kiu lerte zorgis pri la telegrafaj aferoj dum la porrespublikaj revoluciaj tagoj. Nian koran gratulon al la samideano Soler Valls pro lia elstara posteno, kiun li tre meritplene okupas, kaj ni ĝojas, ke li de nun estos Barcelonano.

— La direktoro de “Kataluna Esperantisto”, S-ro Jaume Grau Casas, estas nomita Sekretario de la kataluna vilaĝo Sant Quintí de Mediona, je 65 kilometroj de la Barcelona ĉefurbo, apud Sant Sadurn de Noia, la konata produkto de la kataluna ĉampanvino. Fine de la Junia monato li transloĝiĝis kaj lia adreso estas: Joan Sardà, 33. Prosperon en lia nova okupo.

— Nia estimata samideano Conrad Domènech, el Petra (Mallorca), havis la feliĉon esti patro de ĉarma kaj bonfarta infanino, kiun oni baptis sub la nomo Assumpció Domènech Morey.

Al nia amiko kaj lia edzino ni deziras feliĉajn horojn apud fraŭlino Assumpció.

— La malnova Grupo “Barcelona Stelo” transloĝiĝis en novan ejon kie ĝi havas tre vastan kaj ampleksan ĉambron. La nova adreso estas: URGELL, 180, Cooperativa.

NEKROLOGO

Kun granda ĉagreno ni sciigis pri la morto de S-ino Rosalia Balart, patrino de nia fervora samideanino Paquita Martí kaj bopatrino de nia iama Administranto kaj sincera amiko Francesc Rossell.

Al la funebranta geedza paro kaj kunfamilianoj ni esprimas nian sinceran kondolencon.

KATALUNA

ANTOLOGIO

DUA ELDONO

JAM APERIS

VERKO REKOMPENCITA DE LA
“ESPERANTISTA AKADEMIO”

416 p.: 16 × 22 cm.

PREZO: 10 PESETOJ

(Ekster Iberio, oni aldonu 20 % por sendkostoj)

Mendu de la Kompilinto:

S-ro JAUME GRAU CASAS

Secretari de l'Ajuntament

SANT QUINTÍ DE MEDIONA

(Katalunujo)

LINGUAPHONE

estas la plene scienca metodo por lernado kaj lernigado de

ESPERANTO

kaj aliaj lingvoj praktike.

Estas libroj kun ilustraĵoj kaj traduko por la vido kaj kompreno.

Estas diskoj enparolitaj de Edmond Privat por la aŭdo, ripetado kaj lernado.

Petu senpagan propagando-broŝuron detale klarigan. Sciigu viajn nomon kaj adreson al ,

LINGUAPHONE INSTITUTE en Barcelona

strato València 245.—Poŝtkesto 319.

Nomo

Strato

Urbo